



Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Rakontoj laŭ kuboj. Krucenigoj

Preparas: Milan Kolka

Rakontoj laŭ kuboj (origine Rory's Story Cubes) estas vortludo kun bildkuboj. Ĝetu kaj rakontu laŭ kuboj. Bona paroliga ludo, taŭga ankaŭ por komencintoj. En dua parto ni solvos krucenigon..

Ekzercado

La programo estas taŭga por komencintoj.

Vhodné i pro čerstvé esperantisty.

Ĉeesta programo.

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 3-an de majo 2022 je la 18-a h.

Kie: Občanský klub, [Hybešova 65a](#), Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybešova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la [mapon](#). La plej proksima tramhaltejo estas Václavská (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)



Cetera programo en majo

La 10-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita* . Rete per Skajpo

La 17-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita*. Občanský klub, Hybešova 65a

La 24-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita*. Rete per Skajpo

La 31-an **Historio de Ukrainio** – Oldřich Arnošt Fischer. Občanský klub, Hybešova 65a

Mi petas vin, ke vi proponu programon por resto de majo. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos.



Ni rekomendas

- La 2–10 an de Julio, 2022 **Somera Esperanto-Studado**, Trenčín, Slovakio
bona okazo plibonigi sian lingvonivelon kaj paroligi sin. Kutime partoprenas ĉirkaŭ 200 homoj el multaj landoj. Bonega aranĝo, kiu saltos vin en esperantistan mondon.
- Trapasu **KER ekzamenon** rete. La retaj ekzamenoj okazos (ĉiam kompleksa, skriba, parola): C1 18a de junio 2022, B2 25a de junio 2022, B1 2a de julio 2022. Pli da informoj kaj aliĝilon trovu ĉe <https://edukado.net/novajhoj?id=871>.
- Ekde septembro Adam Mickiewicz Univerŝitato en Poznań planas lanĉi novan tipon de studado. Temas pri du jara ĉeesta **magistra studado**, fako **Interlingvistiko** kadre de Lingvistiko kaj informmanaĝado. La studadoj estos en la angla kaj en Esperanto (ambaŭ lingvoj bezonataj). **Studprogramo estas alkroĉita**. Por pli da informoj bonvolu kontakti prof. Ilona Koutny (ikoutny@amu.edu.pl)
- Vizitu **Arbaristan Panteonon**, belegan lokon tuj apud Brno. Reto de firmaj arbaristaj vojoj taŭgaj por promenoj, biciklado kaj promenoj kun infanĉaretoj, belegaj diversspeciaj arboj

apude, monumentoj kaj akvofontoj (bedaŭrinde pro longa seko nur kelkaj kun akvo). Propagandisto te tiu ĉi regiono estas esperantisto Miroslav Hruška. La retejo estas ankaŭ esperantlingva. Se vi ĵus ne estas fermita hejme pro la ĉina malsano, iru eksteren kaj promenu en aŭtuna naturo. Faru ion por via sano. La regiono estas atingebla rekte el Brno per publika transporto.

- La 9-17-an de Julio, 2022 **56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, KLAIPĖDA, Litovio
- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Milan Kolka
prezidanto